

Kataluna Esperantisto



NUMERO 337 (103)
KVINA EPOKO
JANUARO-MARTO 2006

Aktivula kunveno

Esperanto.cat

Canet atendas ĉiujn

Komuniko de KEJ

*Tres mil llengües
en perill*

*Més de cent cinquanta
llengües a Mèxic*

*L'anglès amenaça
la Gran Bretanya*

*La dek ses fundamentaj
malreguloj*

Disaj sed ne misaj

La llengua de l'imperi, l'imperi de la llengua

*La lengua fue siempre compañera del imperio
(La llengua sempre va acompanyar l'imperi)
Antonio de Nebrija*


Antigament, quan el cercle de relacions socials era més limitat que ara, la parla pròpia era suficient per als contactes entre grups humans propers. La comunicació entre les persones era generalment oral i sense problemes de llengua. Més tard, la revolució de les telecomunicacions amb l'aparició del telèfon va fer possible la comunicació oral directa amb persones més allunyades. Actualment, el grau de desenvolupament dels mitjans de comunicació (ràdio, televisió, internet) i de transport (tren, avió) permet la comunicació entre persones de qualsevol punt del planeta.

Les potències europees que van colonitzar el món rarament estaven disposades a reconèixer que les llengües de les cultures colonitzades tenien valors i drets. El colonialisme implica invariablement la superioritat de la llengua dels colonitzadors, fins i tot des-

***La posició actual
de l'anglès, del francès,
del castellà
o del gallego-portuguès
mostra amb quant d'èxit
i crueltat es va aplicar
la imposició lingüística***

prés de la descolonització. Aquest fou l'element central de l'uropeïtzació del món. Al començament del colonialisme, les principals llengües europees eren parlades per uns pocs milions de persones. La posició actual de l'anglès, del francès, del castellà o del gallego-portuguès mostra amb quant d'èxit i crueltat es va aplicar la imposició lingüística.

Actualment, les pressions de la mundialització comercial i mediàtica condicionen l'acceptació i l'estudi

Segueix a la pàgina 12 



Ŝulhofe lamentu poetoj!

**Ni laboru,
sed ni ne forgesu,
ke ni ĉefe devas ĝui
nian aktivadon
kaj nian
esperantistecon**

Maloŭte al aktivuloj mankas ideoj, sed kutime nur tempo por efektiviĝi ilin. Male, foje mankas perspektivoj, aliaj opinioj, objektivaj analizoj antaŭ kaj post la agadoj, kaj reguleco. Tion povas fari nur kolektivo sufiĉe bunta, por ke aperu novaj vidpunktoj kaj neantaŭviditaj proponoj; sufiĉe kompakta por facile interkonsenti; sufiĉe malgranda, por facile kunveni kaj malrigide diskuti; sufiĉe gran-

da, por sukcese aliri gravajn projektojn pli entuziasmigajn; sed ĉefe, sufiĉe fidinda kaj laborema, por efektiviĝi la interkonsentojn kaj iom post iom, laŭŝtupe, aliri celojn postulantajn pli da tempo por plenumiĝi.

La februara kunveno en Benicàssim (Plana Alta) de 15 aktivuloj, plej ofte junaj, estis ia daŭrigo de simila kunsido en Dorres (Alta Cerdanya) antaŭ jaro kaj duono. Tiam estis lanĉita la esperanto-eldono de Indymedia Barcelono. En Valencilando kunvenis duoble pli da homoj, la plimulto pli spertaj. Estis diskutitaj multaj proponoj kaj la partoprenintoj en ambaŭ kunvenoj povis konstati la maturiĝon de ide-framo. Elstaras ekzemple la aparta intereso kunlabori kun aliaj asocioj en komunaj projektoj kiel bazo de informado, kio fariĝas eble la ĉefa celo de la aktivado.

Kaj ankaŭ grave: la kunvenoj estis multthoraj, sed ege gajaj. Ni laboru, sed ni ne forgesu, ke ni ĉefe devas ĝui nian aktivadon kaj nian esperantistecon. Ŝulhofe lamentu poetoj!

Hektor Alos i Font



*Benicàssim,
la 4an de februaro
2006*

En ĉi tiu numero kunlaboris: Abel Montagut, Albert Gorrell, Carles Verdugo, Darío Rodríguez, Ferriol Macip, Gabriel Mora i Arana, Gerard Escuer, Guillem Portell, Joan Inglada, Manel Vinyals, Ramon Perera, Xavier Margais.

Registrita ĉe "Generalitat de Catalunya" en la unua sekcio per n-ro 5785
Membro de FOCIR (Federacio de Katalunaj Organizaĵoj Internacie Agnoskitaj)

Peranto de: UEA (revuoj Esperanto, Kontakto kaj libroj), FEL (revuo Monato kaj libroj), IKEL (revuo Etnismo), La Kancerkliniko, La Ondo de Esperanto, Scienca Revuo, Komencanto, Juna Amiko, Internacia Pedagogia Revuo, La Gazeto, Fonto, Literatura Foiro, Heroldo. Ni peras ankaŭ aliajn revuojn.

Apartat/Poŝtkesto 1008
08200 Sabadell (Vallès Occidental), Catalunya/Katalunio
Tel. 937 109 636; Fakso: 937 163 633

Ret-adreso: kea@esperanto.cat
Ret-paĝo: www.esperanto.cat
Ret-listo: Aliĝoj ĉe listestro@esperanto.cat

Kotizoj por la jaro 2005: Individua Abonanta Membro 38 eŭroj; Individua Subtenanta Membro 76 eŭroj; Individua Dumviva Membro 760 eŭroj; Kolektiva Membro 76 eŭroj; Juna Membro 25 eŭroj.
Banko: Caixa d'Estalvis i Pensions de Barcelona Agència 461 Sabadell, Kontonumero: 2100 0461 90 0200055053
IBAN: ES95 2100 0461 9002 0005 5053
Konto UEA: kaea-b
CIF: G-58338567

Plenumkomitato de KEA: Prezidanto: Josep Franquesa; sekretario: Hektor Alos i Font; kasisto: Llibert Puig; komitatanoj: Gemma Armadans, Mateu Vic, Ramon Perera.

Kontrola Komisiono: Christian Pinard, Luz Vázquez, Òscar Puig.

Kataluna Esperantisto: Hektor Alos i Font; esperantlingva revizianto: Ramon Perera; katalunlingva revizianto: Guillem Portell; kompostanto: Ferriol Macip i Bonet.

La artikoloj publikigitaj en Kataluna Esperantisto ne nepre esprimas la starpunkton de KEA, se ili ne estas subskribitaj ĝianome.

Kataluna Esperanto-Junularo:

Registrita ĉe "Generalitat de Catalunya" en la tria sekcio per n-ro 102-AJUV. Landa sekcio de TEJO. CIF: G-58964461

Ret-adreso: kej@esperanto.cat
Ret-paĝo: www.esperanto.cat/kej
Ret-listo: Aliĝoj ĉe www.moviments.net/cgi-bin/mailman/listinfo/kej

Estraro: Prezidanto: Lluís Batlle; vicprezidanto: Pau Climent; sekretario: Joan Català; kasisto: Roger Prieto.

Impres a/Presita ĉe: Copimatge, Sant Cugat del Vallès (Vallès Occidental), Tel. 935 892 368. Dipòsit Legal: B-27362 - 1982

Aktivula kunveno

De la 3a ĝis la 5a de februaro 2006 kunvenis en Benicàssim la aktivuloj Ferriol Macip, Gerard Escuer, Hèctor Alòs, Joan Català, Josep Maria Milla, Josep-Enric Peres, Kasia Idziaszczyk, Lluís Batlle, Mon Cardona, Olga Ĉernišova, Pau Climent, Vicent Gimeno kaj Xavi Batlle. Partatempe ĉeestis ankaŭ Manel Vinyals kaj Hu Xu. La celo de la kunveno estis analizi la staton de la kurentaj projektoj, proponi novajn agadojn kaj interkonsenti pri listo de taskoj, kiuj ne nur estas farindaj, sed ankaŭ fareblaj.

Unue okazis ĝenerala diskuto ĉirkaŭ la demandoj “por kio esperanto?”, “al kiu ni proponu esperanton?” kaj “al kio utilas esperanto-asocio?”. La celo estis pliglatigi komunan grundon faciligontan la postajn diskutojn pri la taŭgeco de proponoj kaj ilia prioritato. Sekvis detala traesploro, dum ĉ. ok-hora diskutado en du sesioj, pri la projektoj lanĉitaj de diversaj aktivuloj.

Stariĝis laborgrupo por gazetaraj artikoloj kaj alia por preparado de ekspozicio inaŭgurota en la kongreso de Amposta. Tria grupo okupiĝos pri esperanto-varetoj (pingloj, flagoj, T-ĉemizoj k.s.), kiuj estas aparte gravaj por budoj. En ĉi tiu jaro lanĉiĝos ankaŭ tri novaj ret-projektoj: la katalunigo de la Nitobe-retejo de UEA pri lingvaj problemoj, la esperantigo de la novaĵejo Indymedia La Plana kaj monda kalendaro de esperanto-aranĝoj. Aliflanke estis diskutitaj



diversaj eblecoj diskonigi: plimultigi budojn kaj prelegojn, kaj distribui *Katalunan Esperantiston* al bibliotekoj.

Sed la plej malfacila montriĝis rezigni ŝatatajn ideojn, kiel la esperantigon de Indymedia Alacant, aŭ la restarigon de barako en Sabadell aŭ esperanto-programon en *Ràdio Trama*. La kunveno konsideris, ke mankas fortoj, kaj ke la laborinvestoj estos tro grandaj kontraŭ la kurtatempa profito, do ili forfalis el la ĉi-jara programo.

Tiaj ĉi kunvenoj estas regule okazigindaj kaj la partoprenantoj jam pensis pri alia en la venonta jaro.

Kriza Asembleo

La jara asembleo de KEA okazis, kiel ekestas kutimo, en la lasta sabato de februaro. Ĉeestis ne pli ol 16 membroj, kaj la tagorderoj pasis rapide kaj preskaŭ sen komentoj. Sed alveninte al la lasta punkto, parta renovigo de la estraro, estiĝis malagrabra diskuto pri la kandidatigo de Sylvie Roques, el Tuluzo. La sekretario, Hektor Alos informis, ke la leĝo pri asocioj ne permesas, ke eksterlandaj civitanoj ne laŭleĝe loĝantaj en la lando fariĝu estraranoj de asocioj, pro kio ne eblas akcepti la kandidatigon, sed proponis, ke Roques, jam membro de la Kontrola Komisiono, transprenu pliajn taskojn sen estrara posteno. Sed la kandidato diris, ke tio

ne interesas ŝin, ĉar ŝin plej multe interesas aliri la estrarajn diskutojn kaj dokumentojn, ĉar, kiel membro de la Kontrola Komisiono, ŝi ne ricevis ĉiujn informojn, kiujn ŝi petis. La sekretario substrekis, ke ĉiu tio estas tre grava akuzo kontraŭ la estraro, kaj Ramon Perera aldonis, ke akuzanto devas pruvi siajn asertojn. Post diskuto, Sylvie Roques demisiis de sia posteno en la Kontrola Komisiono kaj informis pri sia eksiĝo el la asocio.

Fine, la estraron eniris Gemma Armadans, kiel voĉdonanto. Llibert Puig anstataŭis Oscar Puig en la kasista posteno, kaj Hektor Alos estis reelektita kiel sekretario. Li anon-





La tri katalunaj prelegantoj en la Atlantika Plonĝado

cis, ke ĉi tiu estos lia dua kaj lasta sinsekva mandato en ĉi tiu posteno. En la Kontrola Komisiono, reelektiĝis Christian Pinar kaj Òscar Puig transprenis la vakantan postenon.

Vespermanĝo en Mataró

Dek ok homoj renkontiĝis la 11an de februaro por vespermanĝi en Mataró. Temis ĉefe pri partoprenintoj en la mult-lernanta kurso pasintjara en tiu urbo, kiuj ne volas perdi la kontakton kaj emas plani komunan vojaĝon al la ĉi-jara Internacia Junulara Kongreso en Sarajevo. Kaj kiel kutime la vespermanĝo longiĝis, de ejo al ejo, preskaŭ ĝis matenmanĝo.

Atlantika Plonĝado

Sep katalunoj partoprenis la Atlantikan Plonĝadon organizitan de Portugala Esperanto-Asocio en la unua semajnfino de marto. Temas pri reciprokiĝo de la partopreno de portugaloj en nia pasintjara renkontiĝo en Mataró, kie estis neformale interkonsentite, ke la aranĝon organizos katalunoj, portugaloj kaj hispanoj, ĉiu en la sekva jaro, en similaj datoj.

La Plonĝadon partoprenis trideko da homoj, inter kiuj sufiĉe multaj komencantoj. La fortega vento kaj ofta pluvo malemigris efektivan plonĝadon en la maro, kvankam ĝia muĝado bone aŭdeblis el la gastejo. Kurioze, la solajn tri prelegojn de la programo faris katalunoj: Hektor Alos pri “Johansson kaj Steele: Trarigardo de niaj nun plej verkemaj prozistoj”, Ferriol Macip pri “Okcita-

nio, nevidebla lando, neekzistanta parolata lingvo” kaj Gerard Escuer pri “Andoro, la lasta feŭda ŝtato de Eŭropo”. Male, nokte la partoprenantoj ĝuis tre interesan kinoprogramon kun filmoj perfekte subtitolitaj al esperanto.

Por la aragona

KEA aliĝis al la Manifesto por la Unueco de la Aragona Lingvo lanĉita de la plej gravaj aragonismaj asocioj kaj subtenita de multnombraj institucioj kaj jam de kelkmiloj da individuoj. Pasintjare KEA simile aliĝis al manifestacio por la okcitana lingvo. Reciproke, indas memori, ke jam en 1906 hungara esperanto-asocio aliĝis al la 1a Internacia Kongreso de la Kataluna Lingvo.

Esperantiste kaj liberecane

La ĉi-jara Liberecana Agendo, eldonita de la Liberacana Ateneo de Igualada, publikigas artikolon de Hektor Alos pri esperanto. Ĉiun monaton en la agendo antaŭas artikolo pri malsama temo: pri la situacio de la malliberuloj en la karceroj, kontraŭ la kuglotrajno, por edukado en libereco ktp. Esperanto eniris en tiun grupon de 12 agadoj danke al la regula aktivado de la esperantistaj liberecanejoj.

Esperanto.cat

Post la funkciigo de la ret-regiono .cat por “la kataluna lingva kaj kultura komunumo”, la 13an de februaro komenciĝis longa kaj kompleksa procezo, por ke la dezirintoj ricevu novajn ret-adresojn. KEA, unu el la 90 asocioj siatempe subtenintaj la iniciaton, situis inter la unuaj ricevintaj novan ret-adresojn. Tial la nova adreso de la TTT-ejo de KEA fariĝis www.esperanto.cat (analoge al famaj retejoj kiel la belga www.esperanto.be aŭ la sveda www.esperanto.se). Ankaŭ la retroŝtaj adresoj ŝanĝiĝis, tiel ke, ekzemple, la nova retroŝta adreso de KEA fariĝis kea@esperanto.cat anstataŭ la eksa kea@esperanto-ct.org. Similajn ŝanĝojn spertis la ceteraj retadresoj de niaj lokaj grupoj kaj aktivuloj. La malnovaj ret-adresoj plu funkcios dum minimume kelkaj monatoj por permesi kiel eble plej glatan transiron por ĉiuj.



La Liberecana Agendo 2006 publikigas artikolon pri esperanto

Kataluna Esperantisto en Libera Folio

La recenzo de Hektor Alos “Fiaska prezento de lingva egaleco” aperinta en la lasta numero de nia revuo estis republikigita en la reta gazeto *Libera Folio*. Ĉi tiu ĉiam pli elstara kaj leginda eldonaĵo jam aperigis en la pasinta septembro alian kritikan artikolon de la sama aŭtoro sub la titolo “Esperantistoj ne konas la realon”.

Prelegmaratono

En aprilo kaj majo oni preparas sinsekvan serion de prelegoj pri esperanto, kio de longe ne okazis: entute naŭ.

La 1an de aprilo, Guillem Sevilla kaj Pau Climent prelegos en Sant Celoni dum la 1aj Studentaj Labortagoj organizitaj de Studenta Kunordiga Komitato de Kataluna Lando. La 6an, 7an kaj 8an Ferriol Macip kaj Josep Maria Milla prezentos esperanton en Casals Jaume I de Acció Cultural del País Valencià de Mutxamel, Elx kaj Benidorm. Ankaŭ la 6an de aprilo Lluís Garcia prezentos esperanton en la mezlernejo “La Mercè” de Martorell, kadre de kulturtago, kie oni pritraktos ankaŭ la eŭskan kaj la araban.

La 21an de aprilo venos la vico de du aliaj mezlernejoj: tiu de Badia del Vallès kaj “Miquel Biada” de Mataró. Prelegos Ferriol Macip, Josep Maria Milla, Carles Verdugo kaj Francesc Verdugo. Kaj la 28an de aprilo gastigos la mezlernejo de Argentona.

Laste laŭ la nuna programo, la 3an de majo Ramon Perera prelegos en Col·legi d’Enginyers Tècnics Industrials de Barcelono.

Pretiĝas budoj

Kiel jam fariĝas tradicio en la Librotago, la 23an de aprilo, nia asocio aranĝos du budojn. Kiel kutime en Sabadell, ĝi situos en la ĝardeno de Caixa de Sabadell, dum en Barcelono, ankaŭ kiel kutime, la urba konsilantaro nur lastmomente konfirmos, ĉu la budo situos en Rambles, tuj apud Plaça Real, kie ĝi staris en la pasintaj du jaroj.

Canet atendas ĉiujn

En tiuj tagoj finpretiĝas la programo de la 3a Printempa Renkontiĝo, la 29an, 30an de aprilo kaj 1an de majo en Canet de Mar (Maresme). Ĝi sekvos la strukturon de la pasintjaraj renkontiĝoj en Mataró kaj Barcelono, kun tri samtempaj programeroj por plenaj komencantoj (en la kataluna), por progresantoj (ĉefe paroligaj rondoj) kaj por fluaj parolantoj. Ĉi-foje plej ofte aldoniĝos kvara paralela programero, por aktivuloj. Krome, ĉar la renkontiĝo longiĝis je duontago pro la ferio de la 1a de majo, la tuta aranĝo finfine gastigos ĉ. 50-60 malsamajn programerojn, gvidotajn de dudeko da homoj. La programoj estos diversaj: kursoj, prelegoj, diskut-rondoj, atelieroj, ekskursoj – ĉio plej vikle kaj partoprenige. La multeco de aranĝoj, kaj ilia mallonga daŭro (po unu horo), celas havigi buntan elekton kaj malgrandajn grupojn faciligantajn personajn kontaktojn kaj partoprenemon. Sed eblas ankaŭ facile eskapi el tro densa esperanto-etoso: tuj apud la plaĉa junulara gastejo kuŝas fajnasabla plaĝo.

Do, ek! Aliĝu! Kion vi atendas?

**En aprilo kaj majo
oni preparas serion
de naŭ prelegoj
pri esperanto**

3a PRINTEMPA RENKONTIĜO III JORNADES D’ESPERANTO

**del 29 d’abril a l’1 de maig
a Canet de Mar (Maresme)**



**informació i inscripcions:
www.esperanto.cat/3printempa**



La Statuto en Monato

La frontpaĝon de la februara numero de la magazino Monato ornamas dek-etaĝa homturo de Castellars de Vilafranca kaj la titolo “Katalunio: Survoje al pli granda memregado”. Interne kuŝas tri-paĝa artikolo de Hektor Alos i Font, regula kunlaboranto de la revuo, pri la projekto de nova statuto de aŭtonomio de Katalunio. Dum la artikolo klarigas la gravecon de statuto en la hispania leĝaro kaj la procezon laŭ kiu ĝi estis diskutita en la katalunia parlamento, aparta teksto-skatolo kun la tre signifa titolo “Senbrida naciismo en la hispana dekstro” prezentas la reagojn en Hispanio pri la parlamenta propono.

Denove Calders en La Kancerkliniko

En la januara-marta numero de la revuo *La Kancerkliniko* aperis la rakonto “Pro-

videncaj fenomenoj” de Pere Calders, en esperantigo de Guillem Portell. Jam en la antaŭa numero, ĉi tiu juna tradukanto publikigis la faman “Subtila invado” de la sama aŭtoro.

Vigraj reagoj en Le Monde Diplomatique

En la februara numero de la monata gazeto pri internaciaj aferoj *Le Monde Diplomatique*, la ĉefredaktoro Ignacio Ramonet publikigis artikolon pri la diskutoj pri la nova statuto de Katalunio. La ĉefaj artikoloj de la numero, kiel kutime, akurate aperis en la esperanta reta eldono, en kiu la legantoj povas aldoni komentojn. Post kelkaj favoraj reagoj al la opinio de la revuo, la fifama ekstremdekstrulo Jesuo de las Heras aldonis longan, plene negativan vidpunkton, en kiu li i.a. defendas la rajton de la hispana armeo puĉi por teni la unuecon de la ŝtato. Lian reagon sekvis serio de pluraj, plej ofte sarkasmaj,

Komuniko de Kataluna Esperanto-Junularo

Leginte tri iniciatojn (www.ipetitions.com/campaigns/ESPERANTO/, www.petitionspot.com/petitions/ESPERANTO, www.petitiononline.com/eo2004/petition.html) por ekuzi esperanton en Unuiĝintaj Nacioj en tri interretaj peticioj, Kataluna Esperanto-Junularo volas esprimi publike sian opinionon.

Tia strategio estas erara kaj ne cel-trafa, sed nur komforta por tiuj, kiuj kredas, ke la ŝanĝoj kaj luktoj de la mondo okazas dank’ al petoj aŭ almozoj. Pro tio, ni tute malkonsentas kun tiaj agadoj.

Ni konsideras ke interretaj peticioj neniam donos fruktojn al niaj luktoj.

Ni rifuzas la fakton ke nia agado baziĝu sur atendoj kaj esperoj de politikistoj. Ni ne atendu, ni agu.

Ni opinias ke la uzado de la angla en tia iniciato estas tute maltaŭga kaj malkohera al nia lingva konscio. Kial ne uzi ankaŭ aliajn lingvojn?

Ni pensas, ke strategioj fiaskintaj en pluraj okazoj lacigas kaj frustras la esperantistaron, des pli se oni proponas subskribi trifoje en tri malsamaj TTT-ejoj.

Ni konsideras, ke unuopaj agadoj plej ofte malŝparas tempon kaj fortojn, kiuj ege mankas al ni. Nia agado por esperanto devas laŭeble baziĝi sur unuecaj agadoj kaj kune pridiskutitaj projektoj, ĉefe ĉe la plej ambiciaj projektoj, kiel tiu ĉi.

Ni ne povas apogi iniciatojn enhavantajn gravajn erarojn, kiel i.a. avertis Bertil Wennergren en soc.culture.esperanto: ke Zamenhof estis pola lingvisto (“polish linguist”), ke la titolo de la libro, kiun Zamenhof publikigis en 1887 estis “Unua Libro”, ke esperanton parolas 2 milionoj da homoj.

Esperanto bezonas bonkvalitan disvastigon farita de ni ĉiuj unuece, ne unuopulajn mesiajn agadojn.

Bonintence kaj bondezire,

Kataluna Esperanto-Junularo

intervenoj, kiun praktike fermas brila kaj modera interveno de Joan Inglada.

Le Monde Diplomatique estas eldonata en 23 lingvoj, inkluzive de la senpagaj rete alireblaj partaj eldonoj en esperanto kaj la kataluna.

Upaniŝadoj katalunigitaj

Du esperantistoj en unu sola interesa verko: aperis *Els Upanishads* (Editorial Moll). Temas pri antologio de la plej elstaraj upaniŝadoj (religiaj hindaj tekstoj verkitaĵoj sanskrite; la plej malnovaj en la 8a jc a.n.e.) kun longa 50-paĝa enkonduko fare de la kompilinto kaj elsanskritiginto, Joan Mascaró.

Joan Mascaró jun-aĝe aktivis en la esperanto-movado (li multfoje aperas en la libro *El moviment esperantista a Mallorca* de Xavier Margais) kaj estis profesoro pri sanskrito en la Aŭtonoma Universitato de Barcelono dum la respublika periodo. Post la milito li ekziliĝis en Anglion, kie li daŭrigis siajn studojn, kaj laŭdire sufiĉe populariĝis dum la 1970aj jaroj.

La verko estas katalunigo de lia klasika traduko al la angla kaj – interese! – ĝin faris alia esperantisto: Elisabet Abeyà. Ŝi fakte jam retradukis de Mascaró *Bhagavad Gita* (parte tradukita de li en la katalunan dum la 1930aj jaroj) kaj *Llânties de foc* (Fajrolampoj), same kiel *La no-violència en la pau i en la guerra* (La neperforto dum paco kaj milito) de Gandhi.

Nia kunmembro Elisabet Abeyà ne nur instruas en elementa lernejo kaj tradukas el la angla (ĉefe porinfanaj verkoj), sed ankaŭ aŭtoras dekon da libroj por infanoj, ilustritaj de famaj desegnistoj, kiel Roser Capdevila, kaj tradukitaj al la astura, bretona, eŭska, franca, hispana, nederlanda kaj sveda. Ŝia lasta verko *El nen que va sortir a la mar* (La enmariĝinta knabo), kun bildoj de Max, aperis en la pasinta jaro kaj fariĝis finalisto en prestiĝa premio.

Els Upanishads. A cura de Joan Mascaró. Editorial Moll, Palma, 2005. 194 p. ISBN 84-273-2169-4

Elisabet Abeyà. *El tren que anava a la mar.* Ilustrat per Max. Inrevés Edicions, 2005. 16 p. ISBN 84-934294-0-6

Esperante en Kolombio

Manel Vinyals partoprenis la 11an Kolombian Esperanto-Kongreson per prelego “Nuntempaj praktikaj aspektoj de esperanto”, kie li klarigis, surbaze de sia sperto, kiel praktika estas hodiaŭ esperanto por vojaĝoj, negocoj, konatiĝo kun aliaj kulturoj, ktp. La prelegon ĉeestis trideko da homoj kaj, pro la kvanto de junuloj, la preleginto rimarkis, ke nia movado nuntempe viglas en Kolombio.



Manel Vinyals prelegas en Bogotá

Malĝojaj sciigoj

La 29an de januaro forpasis nia veterana membro el Manresa Modest Tuset i Canet, 89-jaraĝa. KEA lin omaĝis okaze de la 29a Kataluna Kongreso de Esperanto. Samurbe, la 4an de februaro forpasis ankaŭ Anna Puig i Vilajuana, kiu en 1936 rangis kiel Reĝino en la 17aj Internaciaj Floraj Ludoj, tre sukcese enkadrigitaj en la 18a Kataluna Kongreso de Esperanto.

PER SANT JORDI MUNTEM LA PARADETA

A Barcelona, a la Rambla
i a Sabadell, als jardins de la Caixa

US HI ESPEREM!





Esperanton parolas nur homoj okupantaj tre altajn postenojn

Tiun aserton faris la prezidanto de la Pola Radio dum parolado malfermanta la solenaĵojn de la 70-jariĝo de ĝia internacia fako Radio Polonia.

Kiel informis la esperanto-redakcio de Radio Polonia, la 28an de februaro oni okazigis konferencon en la palaceto de la pola ministerio pri la eksterlandaj aferoj, okaze de la 70-jariĝo de la elsendoj al eksterlando. La konferencon partoprenis ĵurnalistoj, direktoroj de la kompanio kaj polaj ministroj interalie.

Andrzej Siezieniewski, la prezidanto de la akcia kompanio Pola Radio, dum lia malferma solena parolado aparte menciis la laboron de la redaktoroj de la esperantlingvaj programoj de Radio Polonia. Li parolis ĝenerale pri la graveco de la eksterlandaj elsendoj, emfazante la eblecon klarigi al najbaraj nacioj la interesojn kaj kutimojn de la pola nacio, cele al evitado de estontaj rilat-problemoj.

Pri la elsendoj en la internacia lingvo, kiuj famas inter ni, li montris grandan intereson, kaj opiniis grava la fakton, ke la elsendataj ondoj atingas klerajn homojn en la tuta mondo.

Al ĉio ĉi, kio ne konsistigas tre grandan mensogon, la estro de Pola Radio aldonis, ke estas tre grava la fakto, ke la esperantlingvajn programerojn aŭskultas “ĉiuflanke edukitaj” homoj en diversaj nacioj.

Ankaŭ tio, ke esperantistoj estas amantoj de kulturo kaj ĝenerale, se ne kleraj, almenaŭ scivolemaj, ne ŝajnas eksterordinara malvero, sed Andrzej Siezieniewski, tuj post tiu aserto, sin mem demandas laŭvoĉe antaŭ la aŭdantaro: “Ĉar kiu parolas esperanton?”

“Homoj ĉiuflanke edukitaj, homoj okupantaj tre altajn postenojn en siaj landoj” estis la respondo, kaj poste klarigis, kial Radio Polonia elsendas esperante. Li esprimis kiom grava por la pola ŝtato estas disvastigi ĝiajn interesojn inter tia monda elito de postenuloj.

Ĉio ĉi montras, ke Andrzej Siezieniewski trompiĝis pri la esperantistaro. Almenaŭ en Katalunio, al kies movado mi apartenas, la parolantoj de la internacia lingvo estas ĉiuspecaj civitanoj, de laboristoj ĝis studentoj, ĉiuj amantaj kulturon kaj fieraj pri siaj lokoj en la sociaj tavoloj.

Tiu ĉi artikolo ne povas finiĝi sen sincera peto al la esperanto-redakcio de Radio Polonia gvidata de Barbara Pietrzak. Ni volas scii, ĉu la redakcianoj konsentas kun la estro la Pola Radio rilate la asertojn pri la esperantistaro. Ni volas scii, ĉu ili same opinias, kaj ĉu ili ankaŭ celas disvastigon de la intereso de la pola ŝtato, kiu, ni ne forgesu, estas enrudiginta en la irakan teritorion.

Carles Verdugo

32a INTERNACIA SEMAJNO de ESPERANTO de la 19a ĝis la 26a de aŭgusto 2006 en Sèta (Okcitanio)

Kursoj matene kaj posttagmeze, distraj vesperoj kaj ekskursoj

Esperanto, Kulturo kaj Progreso
5, carrièra dau Dr Roux
34090 MONTPELHIÈR

tel+fakso : 33(0)4 67 54 15 43 / retadreso: jf.passarella@free.fr

<http://perso.wanadoo.fr/esperanto.html>

Tres mil llengües en perill d'extinció

Només tres persones parlen el matike, una llengua dels aborígens australians, i ja són molt vells, i a més, a dos d'ells, germà i germana, els impedeix comunicar-se entre ells un tabú tribal... Tot i això al matike li va millor que a d'altres, com els ja extingits damin – que parlaven els joves iniciats de tres illes al sud de Nova Guinea – i l'huró, una llengua en què per dir “ells van saludar amb respecte” calia una sola paraula: “to-honannonronkwanniontak”, literalment ‘es van engreixar el cuir cabellut moltes vegades’. Actualment tots els hurons parlen francès. L'últim parlant competent de l'ubikh – llengua caucàsica que, amb les seves més de vuitanta consonants, ostenta un rècord difícil d'igualar – va morir el 1992 i el futur de l'iutxi, de l'abans pròspera tribu homònima a Oklahoma, no presenta uns símptomes gaire esperançadors.

Això és només una part de l'estat tràgic de les llengües amenaçades, segons el llibre *Aquí se habla*, que xifra en unes 6000 les llengües que encara s'escolten al món i adverteix que és molt i molt probable que a finals d'aquest segle no en quedin més de 3000. De fet, només 600 tenen assegurada la pervivència.

L'autor del llibre és Mark Abley, un escriptor resident a Montreal que ha viatjat al voltant del món buscant llengües en perill d'extinció i parlant amb els seus últims parlants. Abley evita el to especialitzat que, al seu parer, fa a vegades incompreensible els llibres dels lingüistes. Considera que totes les llengües són un patrimoni cultural irrenunciable, “la diversitat de les llengües és el que ens fa humans”, afirma. No considera que les llengües siguin una barrera. “La gent en realitat s'enfronta per altres qüestions. Miri a Irlanda del Nord: tenir la mateixa llengua no ha impedit precisament l'enfrontament.”

En ser interrogat sobre la llengua més estranya, Abley, després de precisar que és estranya “per a nosaltres, no per a ells”, cita el murrinh-patha, l'aritmètica del qual s'atura en el número 5 tot i que té 31 pronoms (que el parlant, és clar, no sap comptar), o el mohawk, una llengua aglutinant amb què es pot dir gairebé tot en dues paraules. No deixa

de ser estrany també, indica, que per als lo-kelele de l'est del Congo la mateixa frase “asoolamba boili” signifiqui, només variant-ne l'entonació, ‘estic mirant la riba del riu’ o ‘estic bullint la meva sogra’.

(Jacinto Antón/El País)

Mark Abley. *Aquí se habla*. RBA, Barcelona, 2006. 384 p. ISBN 84-7871-266-6

Un estudi duplica el nombre de llengües a Mèxic

El nombre de llengües indígenes vives a Mèxic varia segons l'organisme que les quantifiqui, però fins ara es donava per bo el nombre d'una seixantena. Després d'un llarg procés d'investigació, però, l'Institut Nacional de Llengües Indígenes (INALI) està a punt de publicar un catàleg que recull almenys un centenar i mig d'idiomes materns. Les estadístiques determinen que les llengües autòctones més exteses són el nàhuatl (2,5 milions de parlants) i el maia (1,5 milions), seguits pel zapoteca (750.000), el mixteca (720.000) i l'otomi (640.000).

Fernando Nava, director de l'INALI, explica que els càlculs que fins ara es donaven per bons es refereixen a grups culturals i històrics, no a llengües pròpiament dites: “Històricament s'utilitza un nom per agrupar diferents referents indígenes, per exemple, el zapoteca: un territori, un poble, un idioma, un fenotip. Però en termes de llengües no hi ha un idioma zapoteca i no disposàvem de prou investigació lingüística per saber quantes llengües zapotèques existeixen”. Així, el zapoteca de l'Istme no és el mateix que el de la serra d'Oaxaca, els habitants de la qual tampoc s'entenen amb els de les valls centrals. Dintre d'aquest centenar i mig de llengües, hi hauria almenys trenta zapotèques.

Moltes d'aquestes llengües es troben en perill d'extinció, com l'aiapaneca, parlat tan sols per sis persones. Tenen menys de cent parlants el kiliwa i l'aguacateca, mentre que el pàpago i el paipai tenen menys de doscents parlants. Un cas extrem és el de la comunitat tabasquenya d'Ayapan, on una llengua de la família mixe-zoque, emprada pels antics olmeques, avui només és coneguda

Només 600 de les 6.000 llengües tenen assegurada la pervivència

El nou catàleg de l'Institut Nacional de Llengües Indígenes recull més de 150 llengües autòctones a Mèxic



per dos ancians, Isidro i Manuel, però tots dos estan barallats de fa anys i no es parlen.

(M.M.C. / ABC)

L'esperanto als Fòrums Socials Mundials

Una delegació de la Associació Universal d'Esperanto va participar al Fòrum Social Mundial que es va celebrar de 19 al 23 de gener a Bamako, mentre que una altra s'aplegava al 2n Fòrum Social Paquistanès el 24 de gener a Lahore.



Foto: *Libera Folio*

Enguany aquest esdeveniment mundial, que aglutina la societat civil, els moviments socials i les organitzacions no governamentals amb l'objectiu de compartir experiències i discutir democràticament idees tot cercant camins pràctics cap a un món més just, té tres centres: Bamako (Mali), Caracas (Veneçuela) i Karatxi (Paquistan). Els esperantistes, amb la seva temàtica al voltant de la democràcia lingüística i l'ecologia de les llengües, hi participen activament amb tallers i estands.

Encíclica en esperanto

S'ha publicat a l'editorial Editio Ora et Laboro la traducció a l'esperanto de l'encíclica *Deus caritas est* del papa Benet XVI. El text ha estat traduït a partir de l'original alemany pel reconegut traductor i teòleg Reinhard Haupenthal. El Vaticà va publicar l'encíclica en alemany, anglès, castellà, francès, llatí, polonès i portuguès.

(Nun)

Torna Denis Tamba

Després de la seva expulsió d'Alemanya juntament amb un nombrós grup de congoleesos el passat mes de maig, malgrat viure durant 16 anys al país i tenir-hi un fill de 14 anys, el cantant Denis Tamba ha reprès el seu projecte de DVD titulat *Libera* (Lliure).

Denis *Rock* Tamba va néixer a Kinshasa, on va impregnar-se de música durant tota la seva joventut. El 1983, en entrar a la universitat, Denis Rock va començar a tocar i compondre cançons, principalment en anglès. El 1985 va aprendre esperanto i va començar a fer cançons en aquesta llengua, alhora que fundava el grup The 3 Rolls amb companys d'universitat, amb qui feia bàsicament reagee.

Durant la seva època universitària el dictador Mobutu reprimia les manifestacions a trets i enviava els estudiants revoltats a la presó o a l'exèrcit. Finalment, la universitat va ser clausurada i la situació va tensar-se tant que molts joves, entre ells Denis Rock, van decidir abandonar el Zaire.

Va emigrar a Alemanya el 1988, sense dret a estudiar o treballar, però tocar era una excepció que s'escapava dels reglaments legals. Va viatjar per Europa a Holanda, Bèlgica, França i a Dinamarca, on va tenir noves experiències artístiques amb Louison Yambuka i el grup Afrika Espero a partir de 1993 i amb The Black Survivors el 1994.

Entre 1997 i 2002 va escriure cançons amb el grup QBA i va enregistrar el seu primer àlbum en solitari amb el títol *Afrika Nokto* (Nit africana). El 2003 va fundar amb el seu amic sudamericà Jorge Jiménez el grup The Rolls, amb qui va editar l'àlbum *Sunradio* (Raig de sol). En el moment de ser expulsat treballava sobre un nou projecte de DVD, *Libera*, amb imatges i músiques africanes cantades en esperanto.

És aquest projecte que ha reprès ara, en col·laboració amb el grup Masikulu Abha Africa, i del qual la televisió pública congoleesa ha emès recentment un dels clips.

(Vinilkosmo / digitalcongo.net)

La llengua anglesa es converteix en una amenaça per a la Gran Bretanya

Marek Blahuš (de Libera Folio)
Traducció: Joan Inglada

La difusió mundial de la llengua anglesa, de què els països anglòfons, inclosa la Gran Bretanya, tragueren profit durant el segle passat, avui es converteix en un seriós perill per a la posició del Regne Unit. “El millor remei del Regne Unit contra l’amenaça que representa la divulgació de l’anglès és, de fet, aprendre altres llengües.” Això no és cap cita d’algun desconegut activista esperantista anglès, ho afirma un nou informe del Consell Britànic, publicat el dimecres 15 de febrer. La llengua anglesa es converteix en una amenaça per a la Gran Bretanya.

El millor remei del Regne Unit contra l’amenaça que representa la divulgació de l’anglès és aprendre altres llengües

L’informe aparegut sota el títol *The latest threat to the UK...The English Language* (‘l’última amenaça per al Regne Unit... La llengua anglesa’) es basa en una investigació de David Graddol, anomenada English Next (Futur Anglès) www.britishcouncil.org/learning-research-englishnext.htm. Un concís comunicat de premsa en anglès es troba a www.britishcouncil.org/home-newsfeed-150206-english-language.pdf.

David Graddol és un lingüista britànic, que va participar de l’últim simposi Nibto a Vílnius i membre del comitè de redacció de la revista *Language Problems & Language Planning*. Aquesta revista, sobre “problemes lingüístics i planificació lingüística”, és una publi-

cació de la prestigiosa empresa editorial John Benjamins amb la col·laboració del Centre d’Investigació i Documentació sobre el Problema Lingüístic Mundial, organització fundada el 1952 en el marc de l’Associació Universal d’Esperanto.

En la seva nova investigació, Graddol constata que, mentre el nombre de persones capaces de parlar l’anglès s’aproxima als dos miliards a tot el món, desapareix ràpidament aquest avantatge, de què abans els ciutadans britànics gaudien gràcies al fet de tenir l’anglès com la seva llengua oficial. Els estudiants britànics unilingües poden esperar un futur incert, diu l’informe, ja que els bregats joves plurilingües d’altres països posseeixen un avantatge competitiu per damunt dels seus col·legues britànics en companyies i organitzacions multinacionals.

Les minories ètniques de la Gran Bretanya poden ser un ajut significatiu

John Whitehead, del Consell Britànic, diu que és “absolutament essencial que els nens britànics aprenguin altres llengües”. Afegit a això, Graddol en la seva investigació adverteix, que les eleccions d’aquestes llengües s’ha de pensar amb atenció, i després proposa algunes llengües concretes – els nens britànics han d’aprendre el castellà, el mandarí i l’àrab. El paper del francès com a llengua internacional, segons l’informe, es redueix. També cal remarcar que com a ajut probablement significatiu en el procés de multilingüisme s’esmenten les minories ètniques de la Gran Bretanya.

La principal causa de la pèrdua d’avantatge dels britànics, segons Graddol, és el fet que per tot el món avui existeixen moltes persones joves que dominen perfectament l’anglès i que a més sempre parlen com a mínim una altra llengua. Com a causa del grandíssim creixement de popularitat de l’anglès durant els últims anys, l’autor a la seva obra presenta el fet que en molts països, incloent-hi la Xina i l’Índia, ja no s’ensenya com a llengua estrangera de veritat.

L’anglès allí, segons aquest lingüista, ràpidament es converteix en una altra cosa, diguem-ne “capacitat bàsica quasi universal”. Les estadístiques mostren que gairebé el 60% del escolars xinesos aprenen l’anglès. A més, el nombre total de parlants de l’anglès a l’Índia i a la Xina –500 milions– actualment supera el nombre de parlants a la resta del món.

Finalment l’informe del Consell Britànic conclou que en aquesta investigació hi ha una crida a l’acció imminent a tota la Gran Bretanya i recorda sobre els projectes ja començats d’ensenyament de llengües estrangeres a les escoles britàniques, que tenen per objectiu poder evitar el futur incert que profetitza Graddol. Es tracta principalment de l’ensenyament experimental del mandarí en algunes escoles i sobre projectes pioners d’intercanvis lingüístics d’estudiants i mestres dins Europa i en el món àrab, i també en països més llunyans com Rússia, Japó i els països de l’Amèrica del Sud.

Per als esperantistes aquest informe és sens dubte molt important i no només perquè el seu promotor és una persona

L'anglès no pot ser l'únic instrument de comunicació internacional

d'alguna manera lligada a l'activitat pública del moviment esperantista. Després del primer informe de la Comissió Europea sobre multilingüisme, que aparegué l'any passat a finals de novembre i afirmava clarament que "amb l'anglès no n'hi ha prou", l'informe del Consell Britànic representa un indicador més del fet que les associacions internacionals importants actualment comencen a conscienciar-se sobre la insostenibilitat de la situació quan en un grup de diferents estats d'igual rang hom es comunica només amb la llengua d'un d'ells.

En el món en el qual fins i tot la principal organització, l'objectiu bàsic de la qual és "fer avançar la llengua anglesa i la cultura de la Gran Bretanya a l'estranger", ja reconeix que l'anglès no pot ser l'únic instrument de comunicació internacional i instiga al multi-

lingüisme, ja no hi ha lloc per sortides com "l'anglès ja ha vençut, per què he d'aprendre altres llengües?". Sembla que els cavallets actualment donen una volta més i que una altra llengua fins ara no tan significativa, com per exemple alguna de les mencionades a l'informe, podrà aviat convertir-se en l'anglès del futur.

Pot ser que actualment ja es visqui el començament d'un període en què es farà més patent l'efimeritat de l'hegemonia mundial d'una llengua nacional. Seria assenyat que els esperantistes procuressin ara aprofitar-se d'aquesta situació i aconseguissin proposar la seva solució preferiblement abans d'esperar fins que comenci a dominar el món, durant l'època següent, una altra llengua nacional, que després al seu torn serà substituïda per alguna altra. □

☞ ve de la portada

Les pressions de la mundialització comercial i mediàtica condicionen l'acceptació i l'estudi de l'anglès

Les llengües que poden ser escollides com a llengües de la Unió Europea són les oficials al territori d'un estat. Això exclou, per tant, llengües nacionals com el català o l'occità, encara que tinguin més parlants que algunes de les llengües oficials

de l'anglès com a llengua per als contactes internacionals obligatòria per a tothom. Les polítiques del Banc Mundial, de les grans transnacionals i de les productores audiovisuals nord-americanes en consoliden la difusió. L'anglès, considerat "internacional", és vist com a mundialment important, malgrat les evidències que el seu ús en els països sobre els quals influeix de manera política, econòmica, militar o cultural, està al servei dels interessos occidentals i no satisfà les necessitats dels pobles que hi viuen.

El principi d'ecologia lingüística té un altre punt de partida. Pressuposa que els parlants de llengües diferents tenen els mateixos drets de comunicació, que el multilingüisme és positiu i que la política lingüística s'ha de regir pels principis d'igualtat i de drets humans.

Algunes llengües, però, reben drets preferents en fòrums internacionals (com l'ONU), en aliances militars (com l'OTAN) o comercials (com la Unió Europea), en organismes que regulen qüestions internacionals (com el trànsit aeri i marítim o les competicions esportives) i en associacions professionals (com les científiques). Aquests organismes acostumen a treballar amb una o més llengües oficials. La llengua que s'hi ha anat imposant cada cop més és l'anglès, acompanyant les revolucions en tecnologia i comunicació i reflectint el poder polític, econòmic i militar de la metròpoli. Aquesta pràctica de

concessió de drets a certes llengües priva als parlants d'altres llengües d'accedir al sistema en igualtat de condicions. Generalment, aquestes pràctiques no són obertes, sinó encobertes. La Unió Europea camina així encobertament cap a la diglòssia, amb l'anglès com a segona llengua de les elits.

Teòricament, a la Unió Europea, la política lingüística, com la cultura, és una competència de cada estat membre, però els processos de mundialització i europeïtzació i els lligams transnacionals en tantes esferes torren la competència estatal, en certa mesura, il·lusòria. D'altra banda, les llengües que poden ser escollides com a llengües de la Unió són les oficials al territori d'un estat. Això exclou, per tant, llengües nacionals com el català o l'occità, encara que tinguin més parlants que algunes de les llengües oficials.

Aquesta preferència de l'anglès no pot amagar fets com que a l'Àfrica el 90% de la població sols parla llengües africanes, o que a l'Índia només entre un 3% i un 5% de la població parlen anglès. Una política lingüística ha de reconciliar l'ecologia lingüística amb les pressions de la mundialització que estan promovent la preeminència de l'anglès. Una política lingüística ha de ser explícita i ha d'incloure condicions iguals per a tots els pobles i totes les llengües.

Albert Gorrell i Vila

La dek ses fundamentaj malreguloj

Abel Montagut (el: La Deko Logo)

Oni ofte aŭdas kaj legas la aserton ke nia lingvo estas sencescepta, absolute regula. Ekzemple: “La gramatiko de esperanto estas tre logika, multe pli logika ol iu ajn gramatiko de la naciaj lingvoj, kaj ĉefe: ĝi ne havas esceptojn”, “la simpleco de la gramatiko, kiu enhavas neniun escepton”, “koncerne la senesceptan gramatikon, ne necesas emfazi, ke tio estas ekskluziva avantaĝo de la lingvo de Zamenhof”. Similaj asertoj vaste spureblas tra nia tuta propagandomondo. Jen kelkaj el ili (kun fontindiko), nur el la du lastaj jardekoj:

“La REGULARITÉ, qui n’a toléré aucune exception aux règles... Toute fonction linguistique est toujours exprimée par le même élément et cet élément exprime toujours la même fonction.” [La REGULECO, kiu toleris neniun escepton al la reguloj... Ĉiu lingva funkcio estas ĉiam esprimita per la sama elemento kaj tiu ĉi elemento esprimas ĉiam la saman funkcion] Pol Denoel, *L’Esperanto dans l’enseignement*, “Sonorilo”, Wilrijk, 1982, p. 9.

“La gramatiko enhavas 16 senesceptajn regulojn...” Edward Symoens, *Al nova internacia lingvopolitiko. La propedeŭtika valoro de Esperanto*, Esperanto-dokumento, Rotterdam, 1992, p. 15:

“[Oni zorgos] ke esceptoj al la reguloj gramatikaj kaj vortfaradaj ne akceptatu.” Macel Leereveld en *L’esperanto*, revuo de itala Esperanto-Federacio, aprile 1998, p. 14.

“Ĝia gramatiko, plej simpla, enhavas nur senesceptajn regulojn” en informa faldfolio de Kataluna Esperanto-Asocio (1990); “Ĝi estas logika lingvo, absolute regula kaj sen esceptoj” en informa faldfolio de Barcelona Esperanto-Centro (1996); “[La gramatiko] konsistas el nuraj 16 reguloj, sen esceptoj aŭ malregulaĵoj” en la 80-paĝa informa

broŝuro *Pro Esperanto* (1997) de Hispana Esperanto-Federacio, p. 35.

La listo estus facile pliampleksigebla. Sed ĉu tio respondas al la realo? Ni analizu ĉiun unuopan regulon de la Fundamenta Gramatiko. Mi citos laŭ la teksto aperanta en la verko de Kalocsay kaj Waringhien, *Plena Analiza Gramatiko de Esperanto* [PAG], UEA, Rotterdam, 1980, 3a eldono, rearanĝinte la regulojn laŭ la originala ordo.

1. Artikolo nedifinita ne ekzistas; ekzistas nur artikolo difinita (la), egala por ĉiuj seksoj, kazoj kaj nombroj.

Rim. La uzado de la artikolo estas tia sama, kiel en la aliaj lingvoj. La personoj por kiuj la uzado de la artikolo prezentas malfacilaĵojn, povas en la unua tempo tute ĝin ne uzi.

Jen unu el la malplej klaraj reguloj. Unuavice ĉar “la aliaj lingvoj” tute ne havas unuecan uzadon de la artikolo. Ekz. en pluraj latinidaj lingvoj kiel en la kataluna, se mi rajtas baziĝi sur mia lingvo, kion la unua fundamenta regulo ŝajne permesas, oni diras: “Posa’t el barret” (Surmetu la ĉapelon), sed en la angla “Put on your hat” (Surmetu vian ĉapelon). En la angla oni senartikole diras: “Cats are stupid” (Katoj estas stultaj), sed ne en la franca: “Les chats sont stupides”. Ne en ĉiuj artikolhavaj lingvoj oni diras: Ludoviko la dekkvara, k.s. En la kataluna ĝenerale oni uzas difinan artikolon antaŭ personaj nomoj: la Maria, l’Enric... (kio ne retroveblas en aliaj lingvoj). Aliflanke la propre esperantaj subreguloj estas konfuzaj aŭ tre komplikaj. Vidu en PAG, paĝoj 95-100: *la Odiseado*, sed *Hamleto*; festonomoj senartikolas: Epifanio, Pasko, Kristnasko... “Sed oni trovas esceptojn: la Pasko (Z); la Pentekosto (Z)”. Krome: la Unua de Majo, la Kristokorpo, la Palmaĵoj...; ĉe geografiaj nomoj: la Ruĝa Maro, sed Ĝeneva Lago; sezonoj kaj aliaj tempodividoj “ĝenerale ne toleras artikolon”:

“fariĝis somero”, “de mateno ĝis vespero”. Sed: “venis la vintro” (p. 98).

Plie oni povas resendi al la fundamenta (mal)regulo n-ro 16 kiu tekstas: *La fina vokalo [...] de la artikolo povas esti forlasata...* Ĉi tiu kontraŭregulo mem estas escepta, kiel konstateblas pro la duboj de la poetoj ĉe la eliziado. Ĉu licas: “sur l’ ĉielo”, “kaj l’ ludanto”, “antaŭ l’ kosma solo”, kaj similaj?

Mi ne komentos la nedifinan uzon de la vorto “unu” en la zamenhofaj: “En unu vilaĝo loĝis du viroj...”, “Unu vesperon, kiam li sidis hejme, ekstere fariĝis terura malbonvetero...”, “Antaŭ multaj jaroj vivis unu reĝo, kiu tiel amis belajn novajn vestojn...” (Fabeloj de H.C. Andersen, p. 13, 55, 107). Tio kontraŭdirus la aserton: “Artikolo nedifinita ne ekzistas”.

Resume, la unua fundamenta regulo havas gravajn esceptojn kiuj ne facile regeblas.

2. La substantivoj havas la finiĝon o. Por la formado de la multenombro oni aldonas la finiĝon j. Kazoj ekzistas nur du: nominativo kaj akuzativo [...]

Eklernanto de la lingvo sur la unua paĝo malkovras ke pluraj inaj substantivoj “(mal)regule” finiĝas per a: Maria, Elizabeta... *Ili kaptis Elzan, Liza kaj Paŭlo, Gerda malaperis*. Multaj propraj nomoj kiuj ja estas substantivoj havas neniun finiĝon: Zamenhof, Kalocsay, Baghy, Auld, Boulton; aŭ iun ajn: “La patrino de Tambu vidas la bildon...”, “La patro de Aka kaj Lute havas kvardek jarojn”, “En ĉiu monato Aka skribas leteron al Karu” (*Esperanto aŭtodidakte*, 1989, p. 46, 100, 101), “Al Maria, Karina kaj Hajnal pro respektive refoja pacienco, babilemo kaj ĉarmo” (dediĉo en *Tendaraj Tagoj*, kajero unu, de Stefan MacGill, 1993). Ĉi-kajere sur paĝo 6 tekstas: “Natalio estas svisino, Tuzla estas jugoslavino...”. Krome oni povus citi multajn

bibliajn kaj klasikajn proprajn nomojn: Lucifer, Miĥael, Levjatan, Vojski...

Kaj kion diri pri la vortoj hodiaŭ, morgaŭ kaj hieraŭ? Krom adverboj ili estas ankaŭ substantivoj, kiel konstateblas laŭ la PIV-aj difinoj kaj zamenhofaj ekzemploj: “Inter la hieraŭ kaj hodiaŭ staris tiu prova mateno”; “ĉiu morgaŭ havas sian zorgon”; “morgaŭ estas la amata tago de mallaboruloj”.

Finbate oni devas rememori la jam cititan 16-an kontraŭregulon: *La fina vokalo de la substantivo kaj de la artikolo povas esti forlasata kaj anstataŭigata per apostrofo*. Do, la substantivoj povas finiĝi je iu ajn litero. Ĉi tiu malreguleco plej multe rimarkindas dum parolado aŭ laŭtlegado, kie “apostrofo” forestas. Precipe substantivaj unusilaboj neniel distingeblas disde la ceteraj.

Laŭ la sama regulo ekzistas nur du kazoj, sed en la praktiko troveblas almenaŭ unu plia: la e-kazo: “tio gravas vilaĝe, ŝi forestas ĝardene, tombe ĵuri venĝon, tempeste forlasis la ŝipo havenon, barelinge vasta ĉapelo” (esprimoj de Grabowski en *Sinjoro Tadeo*, 1918, cititaj de K. Kalocsay en *Lingvo, stilo, formo*, p. 57-58); “Ana, pluas / sama tuluĉapelo surĝardene, / samaj veneroj staras / kolone ĉe la vaskoj, / kariatidas laŭbe kaj balustre...” (Miguel Fernández en *El la sonoraj soloj*, 1996, p. 77). Sed ankaŭ Zamenhof ĝin uzis samvalore: “unu vesperon, kiam li sidis hejme; mi restos hodiaŭ dome.” (PIV-aj ekzemploj).

Supozeble la dua fundamenta regulo ne implicas ke oni povas ĝin returni, t.e., ke ĉiuj o-finiĝantaj vortoj estas substantivoj, ĉar tiam oni kontraŭmetus: maltro, retro, kotopo... Sed sufiĉas pri ĉi punkto.

3. La adjektivo finiĝas per a. Kazoj kaj nombroj kiel ĉe la substantivo.[...]

Kio alia ol adjektivoj estas (laŭ la tradicia gramatiko, surbaze de kiu Zamenhof formulis tiun sian) jenaj korelativaj formoj: “Kiu viro alvenis? Neniu viro, sed virino. Kies ĉapelo ĝi estas? Mia ĉapelo ĝi estas. Tiu ĉi domo ne estas ĉies domo, sed mia, la gepatra domo”.

Se oni emus konsideri ke “tiu”, “ĉies” kaj la parencaj formoj ne adjektivas, tiam ankaŭ ne “mia” aŭ “gepatria”, do, ĉi tiuj vortoj ne devus finiĝi per a... Aliflanke, kio estas la vortoj ĉi kaj nul en esprimoj kiaj “ĉi libroj”, “nul homoj”? Ĉu ĉi-lastaj ne ekivalentas al neniu aŭ neniuspecaj homoj? Do: tradicia adjektivo eksterregula. Plie, kelkaj plus aliaj similspcaj kvantaj adjektivoj, nun klasataj kiel determinativoj, escepte estas uzataj senfinaĵe en poezio almenaŭ ekde Antoni Grabowski. “Nur ankoraŭ kelksteloj lumas el profundo” (*Sinjoro Tadeo*, p. 281).

Ni jam menciis la oftan a-finaĵon ĉe inaj propraj nomoj. Konklude, ne ĉiam adjektivoj finiĝas per a nek ĉiuj a-finaĵaj vortoj estas adjektivoj.

4. La numeraloj fundamentaj (ne estas deklinaciataj) estas: unu, du, tri, kvar, kvin [...]

Tamen, oni deklinacias la unuan: “unu idealoj por la tuta homaro”; “la regado de unuj gentoj super aliaj”; “unu objektoj venis en unujn manojn, aliaj en aliajn manojn”; “unun el viaj fratoj lasu ĉe mi” (ekzemploj ĉerpitaj el PIV, la du unuaj de Zamenhof). Aŭ ĉu kelkfoje “unu” ne estas numeralo, sed nedifinita artikolo? Tiam bonvolu legi la unuan fundamentan (mal)regulon laŭ kiu ĝi ne ekzistas.

Aliflanke troveblas la varianto “un” por “unu”. Ekzemple: “Un! Du! Tri!” en la lernolibro *Assimil* aŭ en la traduko de *Tirano Banderas*, HEF, Madrid, 1993, p. 25.

5. Pronomoj personaj: mi, vi, li, ŝi, ĝi (pri objekto aŭ besto), si, ni, vi, ili, oni; la pronomoj posedaj estas formataj per la aldono de la finiĝo adjektiva. La deklinacio estas kiel ĉe la substantivoj.

Pri la pronomo “ĝi” estas dirate ke ĝi rilatas al objekto aŭ besto, sed: “la infano ploras, ĉar ĝi volas manĝi” (el-PIV-a zamenhofa frazo). Cetere, mankas en la listo la pronomo “ci”. Kaj kion diri pri la uzado de la refleksiva “si”? Ĝi estas unu el la plej gravaj falpuŝiloj de la esperant-

lingvanoj. Preskaŭ neniu plene trafas la ĝustan uzadon. Ĉi-kaze la teoriaj reguleco kaj senescepteco estas nur miraĝaj. Iom simile al la uzo de la akuzativo, kiun ni preterglitis en la dua punkto, sed longaj libroj skribeblas ĉi-rilate: “Mi pentras la arbon ruĝa” kaj “Mi parolas esperanton bela”. Kiu facile regas la regulojn kaj subregulojn? Kaj kion diri pri la novaj pronomoj iŝi, ŝili, ŝi/li kaj similaj?

6. La verbo ne estas ŝanĝata laŭ personoj nek nombroj. Formoj de la verbo: la tempo estanta akceptas la finiĝon -as; la tempo estinta -is; la tempo estonta -os [...] Ĉiuj formoj de la pasivo estas formataj per helpo de responda formo de la verbo esti kaj participo pasiva de la bezonata verbo; la prepozicio ĉe la pasivo estas de.

La tempo estinta alprenas la finaĵon -is. Sed: “ŝi plendis ke pluvas”. Ĉu “pluvas” ne rilatas al tempo estinta? Oni devas aparte lerni la uzon de la tempoj en la subjunkciaj propozicioj, kiel montras la 58 densaj paĝoj en PAG (p. 302-360). Formoj de la pasivo: laŭ la regulo ili formiĝas ĉiam pere de la verbo *esti*. Sed en la praktiko ni renkontas: ili vidatas, troveblas, troviĝas, manĝindas, evitendas, legindas, laŭdatu.... La prepozicio ĉe la pasivo laŭregule estas *de*. Sed oni uzas interalie: *fare de, far...* La fundamentaj participoj ne akceptas, laŭ la plena teksto de la sesa regulo, la formojn -unta kaj -uta, sed ĉi lastaj aperadas kaj parole kaj skribe: “eĉ perfiduntan ŝin mi volas mia, la ofendutoj pardonu” (PIV-aj ekzemploj). Menciendus la -ata / -ita polemiko, sed ne sufiĉas ĉiuj paĝoj de ĉi libro. La imperativo kelkfoje formiĝas per la simpla radiko: “Halt!”, “Marŝ!” Fine, ekzistas neverbaj vortoj kiuj finiĝas verbosimile, ekz.: oni, ili, dektri...

7. La adverboj finiĝas per e; gradoj de komparado kiel ĉe la adjektivoj.

Sed kio krom adverboj estas la vortoj: tiam, ĉiel, nenial, iom, ajn, pli, plu, jam, nun, tuj, jen...? Kaj kio estas la aŭfinaĵaj vortoj: baldaŭ, ankoraŭ, apenaŭ, preskaŭ, ankaŭ, morgaŭ, kaj similaj, en la esprimoj: “ili venos morgaŭ”, “hieraŭ neĝis plu kaj plu”, “mi restos hodiaŭ dome”?

Krome, la pseŭdofinaĵo “aŭ” estas kelkfoje ellasebla, laŭ propono de Zamenhof en 1892. Jen kelkaj ekzemploj el *Sen-tempa Simfonio* (1987), poem-antologio en traduko de Fernando de Diego: “Signif’ ilia kuŝas / arkane, malantaŭe. / Kaj ank’ ilia nomo.” p. 121; “... Kaj tia estas la terura / la stulta forto sen pupiloj / ancor’ pelanta ĉi virinon / iri kaj iri sur la trotuaro...”, p. 135. Por oponiantoj ke nur Fernando de Diego enkondukis similajn novaĵojn, necesas memori ke jam Grabowski avangardis almenaŭ per apostrofado de presk’ (adverbo), anstat’ (prepozicio) kaj apen’ (adverbo). Vidu en *Lingvo, stilo, formo*, p. 60.

Aliflanke, la tradicia kaŭzesprimo “dank’ al”, logike konsistas el “danke al”.

Por plia komplikeco, la finaĵo -e estas uzata ankaŭ por la predikativo, kiu en pluraj aliaj lingvoj estas en tiuj kazoj akjektiva: “resti kun leono estas danĝere...”

8. Ĉiuj prepozicioj postulas la nominativon.

“Ekmarŝi kontraŭ iun”; “ŝi levas la bastonon kontraŭ lin”; “Kaino leviĝis kontraŭ sian fraton kaj mortigis lin”: jen zamenhofaj frazoj kiuj apudiĝas al aliaj kun la sama prepozicio sen akuzativo: “la komitato nenion havas kontraŭ Svisujo”; “ŝi eltiras siajn blankajn manojn kontraŭ la ŝipo”; “kontraŭ neniu oni devas esti maljusta”.

Ĉe aliaj prepozicioj, komparu: “Lot eliris al ili antaŭ la sojlon”; “ĵeti perlojn antaŭ la porkojn”; sed: “oni metis antaŭ mi manĝilaron”; “li montris rekten antaŭ si”. Pli konataj estas la ekzemploj kun prepozicioj kiaj sub, super kaj similaj: “la muso kuris sub la tablon”, “la aŭto veturis trans la riveron”; sed: “pensoj iras trans limo sen pago kaj timo”. “Traflugis anĝelo preter orelo”; “vi pasis preter via sklavo”; sed, kun la sama senco: “ne pasu preter vian sklavon!” (la tri lastaj, PIV-aj ekzemploj estas de Zamenhof kaj de la Biblio). Do, ĉiuj prepozicioj postulas la nominativon, krom kelkaj en multaj eventualoj, precipe kiam temas pri almovo, sed la subreguloj estas mal-simplaj kaj esceptaj.

9. Ĉiu vorto estas legata, kiel ĝi estas skribita.

“Posttagmeze la tankoj transsaltos la barilon”: ĉu efektive vi legis post-tagmeze, trans-saltos, kun du apartaj t-oj kaj s-oj? Ĉu oni ĉiam unuforme prononcas jenajn vortojn: scias, kvar, kvin, absurda, ekscelenco, eksciti, konscienco, matĉo, Finnlando? “Laŭ la teoria vidpunkto [...] ni devas elparoli ĉiun sonon severe aparte; sekve se ni deziras paroli severe regule, ni devas elparoli “pan-jo”, “san-go”, “mi-a”. Sed Zamenhof mem allasas: “Batali kontraŭ tia natura emo en la elparolado ŝajnas al mi afero tute sencela kaj senbezona...” (Respondo 56, *Oficiala Gazeto*, IV, 1911, p. 222). Kion vi pensus, se dum kongreso vi aŭdus anoncanton elparoli: “Post-tagmeze ni rendezuos ĉi tie je la tria”? Oni trovus tion afekta. Do, esceptoj allasatas kaj eĉ kelkaj ennormiĝis. Ĉu la transiro de tehniko al teknika, de arĥitekto al arkitekto, de arĥeologio al arkeologio, por ne paroli pri Ĥinuĵo, ne estis siatempe aŭ estas nun pliaj esceptoj je la normo?

Eblus interpreti ĉi tiun naŭan regulon kvazaŭ ĝi inkluzivus la aserton ke ĉiu fonemo respondas al unu litero kaj inverse. Tion subtenas la diroj de Zamenhof: “la uzado de unu litero por unu sono estas multe pli logika ol la uzado de du literoj” kaj “la fina leĝo por nia ortografio estos: “por unu sono unu litero” (Lingvaj respondoj, n-ro 58, *La Esperantisto*, 1891). Sed ĉi-rilate la *Fundamento* mem, post la listo de la literoj, nuligas la absolutan regulecon: “Rimarko. Presejoj, kiuj ne posedas la literojn ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ, povas anstataŭ ili uzi ch, gh, hh, jh, sh, u.” Krome tekstas ke oni “povas” uzi ĉi tiujn anstataŭojn. En la praktiko oni renkontas plurajn aliajn, precipe: cx, gx, hx, jx, sx, ux, ktp.

10. La akcento estas ĉiam sur la antaŭlasta silabo.

Krom en kelkaj unusilaboj. Evidenta, sed reala escepto. Kaj ne ĉiam la unusilaboj akcentatas sed nur laŭpozicie. Cetere: en apostrofitaj vortoj la akcento tute ne sidas sur la antaŭlasta silabo:

“Rajdant’! La hejmo jam ruin’! Rajdant’! Revokas vin patrin’! Rajdant’! Postploras vin infan’!” (K. Kalocsay, “La nigra rajdanto”, *Ora Duopo*, p. 114). Kaj kion diri pri esprimoj kiaj “vi ‘stas bela”, aŭ pri oftaj personaj nomoj kiaj *Zamenhof*, *Waringhien*, *Kalocsay*? Nur konantoj de la subreguloj (esceptoj) povas ilin ĝuste elparoli laŭ la akcento.

11. Vortoj kunmetitaj estas formataj per simpla kunigo de la vortoj (la ĉefa vorto staras en la fino); la gramatikaj finiĝoj estas rigardataj ankaŭ kiel memstaraj vortoj.

Jen regulo plena de kontraŭdiroj, t.e. de esceptoj. Ĉar la gramatikaj indikiloj logike ne estas la ĉefa elemento de vorto se oni prikonsideras la signifon. Do, oni devus diri: o-ĉeval, a-san, is-kant. Tamen, la gramatikaj indikiloj estas devige finaĵoj. Cetere, -n kaj -j ne estas memstaraj krom escepte.

Jen aliaj kazoj, kie la ĉefa signifoelemento ne staras en la fino: *maneto*, *viraĉo* (komparu kun. *fiwiro*), *arbaro*, *kolumo*... Vd. en PAG, p. 435: “Ĉe radiko-sufiksaj kunmetoj [kun et, eg, aĉ, um] staras ĉiam la sufikso en la fino, eĉ se ĝi ne estas la ĉefa vorto.” Kaj jen aliaj specialaj kunmetaĵoj: *mia sinfido*, *via sinmortigo* (ne: *si-mortigo* aŭ *vi(n)-mortigo*), *ĉiovida* (sed ne: *ĉionvida*, kvankam temas pri “simpla kunigo de la vortoj”), *vivipova*, *pagideva*, *multebranĉa*, *multalingvulo*, *kelkafoje*, *plenmano*, *panjo*, *Vilĉjo*, *onjo*, *Petruĉjo*...

Vaste konatas la nefinitaj (kaj nefineblaj) diskutoj pri la transitiveco de la verboj aŭ pri vortkategorioj kaj radikarkarakteroj: *gladilo*, *ŝlosilo*, *fosilo*, sed *broso*, *martelo*, *pioĉo*; *kudristino*, *okulisto*, sed *tajloro*, *oftalmologo*... Ĉe vortoj kiaj *japano*, *koreo*, *portugalo*, *vjetnamo*, *egipto*... ĉu ni simple kunigu la “vortojn”: japan-an-o, portugalan-o, kore-an-o, vjetnam-an-o, egiptan-o, ktp? Ege komplika kampo de la lingvo, kun multnombraj esceptoj kaj embuskoj, kiuj mem poiom ĥameleone ŝanĝiĝas.



Unua libro de esperanto

12. Ĉe alia nea vorto la vorto “ne” estas forlasata.

Oni ne povas nei ke esperanto estas malfacila. En ĉi tiu frazo kunestas nea vorto kia sendube estas “nei”, do oni devus forlasi la vorton “ne”: “Oni povas nei ke esperanto estas malfacila”. Sed la signifo tute aliĝas. Tial do, necesas klarigoj pri la regulo, kiuj inkluzivas ke la adverbo devas stari senpere antaŭ la koncernata vorto, escepte de kelkaj esprimoj kiel la zamenhofaj: “blindulo kartojn ludi ne devas”, “la ŝuldoj ne estos pagataj de mi”, “ni ne devas malplaĉi al li”. Aliflanke, PIV atentigas: “Respondante al nea demando, kies neadon oni volas konfirmi, kelkaj popoloj, precipe okcident-eŭropaj, uzas *ne*, dum aliaj, precipe orientaj, uzas *jes*”. Do, se atakas vin la duboj post la demando de kisinda knab(in)o: “Ĉu vi ne venos?”, kion vi laŭregule respondu? Ne pre “Jes!” ĉar “ĉe alia nea vorto la vorto “ne” estas forlasata. Pri detaloj kaj esceptoj vidu en PAG, p. 126-128: “Ĝi ne povis ne vidi...” (Z) “tio ne kostis neniom”...

13. Por montri direkton, la vortoj ricevas la finiĝon de la akuzativo.

“Mi vojaĝis al Barcelono kaj veturis ĝis la parko”. Kie troviĝas la akuzativa finiĝo? Denove necesas klarigoj pri la regulo, ĉe kiu aperas abunde da specialaj kazoj. Ni jam prikonsideris plurajn rilatajn al “antaŭ”, “kontraŭ”, “trans”, “pre-

ter”. Kion vi dirus: “La ŝoseo al Barcelono, la ŝoseo Barcelonon, Barcelonen, de Barcelono”? La praktiko malsimplas. En PAG, p. 260 tekstas: “La akuzativo estas uzebla nur, kiam oni atingas la internon de la celo: iri Parizon, lernejon, preĝejon. Do oni ne povas diri: “iri sian amikon, kuri arbon, [...] standardon fiksitane meze de kampo”. Sed oni uzas ĝin tiamaniere, kiam la verbo havas prepozicion prefiksode: aliri sian amikon, alkuri arbon...” Ĉu tio estas esceptoj aŭ kontraŭesceptoj de la fundamenta regulo? Ambaŭ.

14 [a]. Ĉiu prepozicio havas difinitan kaj konstantan signifon...

Ekzemple, la prepozicio *de* laŭ PIV signifas: 1. La punkton de la spaco, kie komenciĝas movo, la malproksimigon, la deiron, k metafore la malsimilecon, la devenon. 2. La punkton de la tempo, kie komenciĝas ago. 3. La metaforan originon, la kaŭzon. 4. La aganton de la ago esprimata per pasiva aŭ pasivsenca verbo. 5. La apartenecon. 6. La posedanton. 7. La posedatan econ. 8. La rilaton inter du subst-oj, el kiuj la dua estas mezuro de la unua. 9. Difinitan limigitan apartaĵon de preparolata aŭ jam preparolita aĵo. 10. La aganton de la ago, kiun esprimas subst. derivita el verbo. 11. La objekton de la ago, kiun esprimas subst. derivita el verbo. 12. Simple la gramatikan dependecon kun iom malpreciza senco. RIM 4 Pro la multisenceco de “de” estas ofte konsilinde anstataŭigi ĝin, se eble, per pli preciza prep. (en, el, pri, pro, super, kontraŭ, antaŭ, ke).

Resume, ĝi havas nek difinitan nek konstantan signifon. Sed ĉu la ceteraj prepozicioj havas? Laŭ la sama vortaro, *en* havas 7 signifojn; *el*, 6; *pri*, 3; *pro*, 3; *super*, 4; *kontraŭ*, 8; *antaŭ*, 4...

14 [b]. ... sed se ni devas uzi ian prepozicion kaj la rekta senco ne montras al ni, kian nome prepozicion ni devas preni, tiam ni uzas la prepozicion je, kiu memstaran signifon ne havas. Anstataŭ la prepozicio je oni povas ankaŭ uzi la akuzativon sen prepozicio.

La prepozicio “je” deinterne detruas la regulon, ĉar ĝi havas nek difinitan nek

konstantan signifon. Fakte, laŭ PIV ĝi havas 6 signifojn, do, ne plie ol la prepozicioj de, kontraŭ, en, el. Kaj la lasta parto de la “regulo” tute ne estas ĝenerale aplikebla. Komparu: *graveda je filo* – *graveda *filon*; *libera je tiuj mankoj* – *libera *tiujn mankojn*; *havi rajton je io* – *havi rajton *ion*; *konduki iun je la nazo* – *konduki iun *la nazon*; *ĝi eltiris je la kornaro nordan cervon* – *ĝi eltiris *la kornaron nordan cervon*; *ĝi retiriĝis je kelke da paŝoj* – *ĝi retiriĝis *kelken da paŝoj*. Tamen, jes ĉe kelkaj esprimoj kiaj: “mi estas je unu jaro pli juna”; “la reĝo vetis kun li je ses berberaj ĉevaloj”. Do, subreguloj kaj esceptoj abundas.

15. La tiel nomataj vortoj fremdaj, t.e., tiuj, kiujn la plimulto de la lingvoj prenis el unu fonto, estas uzataj en la lingvo Esperanto sen ŝanĝo, ricevante nur la ortografion de tiu ĉi lingvo; sed ĉe diversaj vortoj de unu radiko estas pli bone uzi senŝanĝe nur la vorton fundamentan kaj la ceterajn formi el tiu ĉi lasta laŭ la reguloj de la lingvo Esperanto.

Observatorio, observejo, redakcio, redaktejo, redaktoro, redaktisto, direkcio, direktejo, direktoro, direktisto, fragmento, fragila, frakasi, frakcio, frakturo, komputoro, komputero, komputilo, ekzistencialismo, ekzistadismo, ekzotika, ekzota, intui, intuiĉi, sponta, spontana, spontanea... Ĉu tio estas senescepta reguleco? Senkomente.

16. La fina vokalo de la substantivo kaj de la artikolo povas esti forlasata kaj anstataŭigata per apostrofo.

Evidente temas ne pri regulo sed pri kontraŭregulo. Krome, ankaŭ la dekseca allasas esceptojn, ĉar ne ĉiam klaras kiam oni povas apostrofi (fenestr’ panorama; vint’r’ glaciera, vd. supre) kaj eblas interpreti ke la apostrofo *povas* esti anstataŭigata kaj do tute forlasata, kiel oni vidas en kelkaj poemoj:

Acapulco

Acapulco estas ridet kaj vundo.
Belulinoj perfektas je la koks
kaj estas dolĉo en la maro.

Fluadas festotag grandioza,
noktoj sen ajna kompar.

Peter Browne, en *Fonto*, n-ro 261 (sept. 2002), p. 13.

Demandite

[...]

Tegoloj falos, putros homa karno
inter ruinoj kaj – post fum abrupta
en multaj lokoj – restos vundobruiloj
de geviroj ŝiritaj pli profunden
ol pens aŭ sento. Tiam mavo plia:
la lantaj abomenoj de malsato

kaj konscienco. Ie stumblos aŭ kuŝos
ankaŭ mi kaj la miaj, aŭ ni kaŭros
post murkolapso inter frakasitaj
mebloj sub pluv apokalipsa, malemaj
forlasi por vagado tra vakuoj
ĉi korangulon de la kunfeliĉo.
Sentegmentigon certe atendadas
komuna peko kaj senkulp komuna...

Edwin de Kock, en *Horizonto*, n-ro 6
(nov.-dec. 1976), p. 131.

Konklude, malĝustas la aserto ke la
esperantlingva gramatiko konsistas el 16
simplaj reguloj sen esceptoj. Pli ade-

kvatas formuloj kiaj: “Esperanto, lingvo preskaŭ sen esceptoj, kun nur deknunu gramatikaj morfemoj...” (Fernando de Diego, *Nuevo método de Esperanto para clases y autodidactas*, Heroldo de Esperanto, Pisa, 1992, p. 13). Esence nia lingvo estas neniam matematika kodo, sed multifaceta kompleksa strukturo vivanta, kiel ĉiu lingvo; pli simpla-regula laŭ kelkaj aspektoj, precipe laŭ tiuj plej surfacaj, sed multregula kaj implika laŭ aliaj. Verdire ni ĉiuj konsentas ke ĝi estas entute pli simpla ol tiuj naciaj, sed ne je tioma grado ke ĝi lerneblus surbaze de dek ses reguloj senesceptaj. □

Interreta rubriko: soc.culture.esperanto

Ĉi-okaze mi dediĉos la rubrikon al priskribo de soc.culture.esperanto, al kiu mi referencos pli mallonge kiel SCE.

Kio estas SCE? Temas pri interesege internacia forumo pri esperanto, kiu malsamas al la konataj dissendolistoj kiel nia kataluna listo de KEA aŭ aliaj kiel tiuj de la konata gruparo de Yahoo.

Ĝi apartenas al la t.n. “Usenet” kaj konkrete al ties kategorio SOC (socialaj kaj kulturaj temoj).

Informo pri Usenet troveblas en Vikipedio: esperante, en eo.wikipedia.org/wiki/Usenet kaj katalune en: ca.wikipedia.org/wiki/Usenet.

SCE, kiel la ceteraj Usenet-forumoj, ne estas atingebla kiel normala retpoŝto, sed ja ĝi atingeblas per la novaĵ-fakoj de la plej konataj retpoŝtiloj kiel Outlook Express, Mozilla, Thunderbird ktp.

Tiacele vi devas agordi (konfiguri) vian retpoŝtilon por la ricevo de “novaĵoj”: por tion fari konvenas legi la instrukciojn troveblajn en la fako “Helpo” de via retpoŝtilo.

Sed antaŭ ol pretigi tiun agordon nepre necesas trovi la t.n. “servilon de novaĵoj” (angle: “newsserver”). Normale, via interreta provizisto (Telefónica, Wanadoo, Jazztel ktp) devus oferti al vi tiun novaĵservon, tamen, tiuj servoj de iberiaj retprovizistoj estas ege nefidindaj: mi kontrolis, ke en ili, aŭ ne aperas SCE, aŭ se ĝi troviĝas inter la proponataj novaĵ-grupoj, ofte ĝi aperas nekompleta, senigita de multaj mesaĝoj.

Interesas, do, sin aboni al prestiĝa internacia novaĵ-provizisto, normale pagenda. Ekzistas bonega provizisto apartenanta al la Libera Universitato de Berlino, nomata “News.individual.net”. Ĝi ofertas plensekure la grupon SCE kaj multajn aliajn; ĝi kostas po 10 € jare. Vi povas atingi ĝin per news.individual.net Aliĝinte, vi ricevos la pasvorton necesan por agordi la novaĵ-servan fakon de via retpoŝtilo.

Post la agordo, vi ricevos liston de ĉiuj novaĵ-grupoj, inter ili SCE. Elektu ĉi tiun, kaj ĝi aperos en la menuo de la retpoŝtilo, post la fakoj de la retpoŝto. Klakante sur ĝin en tiu menuo, vi ricevos ĉiujn mesaĝojn de SCE konservitajn en la novaĵ-servilo kaj en postaj tagoj



la laste aperintajn. Ili aperos tre simile al la retleteroj. Evidente, viaj mesaĝoj al SCE ankaŭ aperos en la novaĵ-fako de via retpoŝtilo.

Tamen, ekzistas alia tre simpla sistemo por ricevi kaj respondi al mesaĝoj de SCE: tiu grupo estas atingebla per la jena ret-paĝo de Google: groups.google.es/group/soc.culture.esperanto?hl=eo

En SCE ekzistas viglegaj diskutoj pri ĉiuj temoj; ofte, kiam ekestas internacia politika temo, aperas plurdekoj da mesaĝoj ĉiutage, tamen foje la mesaĝfluo malaltiĝas kaj apenaŭ alvenas deko da ili. Oni devas skribi nur esperante (sed oni akceptas demandojn pri esperanto kaj la koncernajn respondojn en etnaj lingvoj).

Darío Rodríguez



Komencantoj: De Montevideo al Hamburgo



eseo: verko pri fako

fuĝi: foriri por ne sperti ian suferon

ĝenerala sekretario: tiu, kiun oni elektas por okazigi la decidojn de organizo

juristo: tiu, kiu laboras pri la tuto de devigaj reguloj

postulemo: emo devigi

statuto: ĉefaj reguloj de asocio

rezolucio: publika opinio de asocio

venko: sukceso (ĉefe kontraŭ malamikoj)

voĉ-donado: grupa elektado

La plej elstara movadano post la dua mondmilito certe estis Ivo Lapenna. Tiu kroata juristo, ankaŭ gravulo en tiu fako, naskiĝis la 5an de novembro 1909 en Split. Post sia esperantistiĝo en 1928 li baldaŭ starigis esperanto-asocion, organizis plurajn kursojn, eĉ la membroj de Jugoslavia Esperanto-Ligo

(JEL) elektis lin kiel prezidanton en 1937. Poste, dum la dua mondmilito li devis fuĝi por ne sperti malliberigon kaj plej eblan mortigon. Post tio li iĝis membro de la nacioliberiga movado en sia lando.

Tamen, jam antaŭ la dua mondmilito li kontraŭstaris la sin-tenojn de multaj esperantistoj rilate al la registaroj, kiuj ne konsentis la plej simplajn homajn rajtojn. Memorindas, ke Universala Esperanto-Asocio (UEA) eĉ okazigis kongresojn en la Germanio de Hitlero kaj la Italio de Mussolini. Li kontraŭstaris ankaŭ la post-militan registaron de Jugoslavio. Pro tio li for-lasis sian landon kaj ekloĝis en Parizo unue kaj post du jaroj en Londono.

De tiam li daŭrigis sian agadon kontraŭ la misuzo de UEA tiel, ke tiu asocio ŝanĝis sian **statuton**, por ke en ĝi aperu rimarko pri

la homaj rajtoj. Li eĉ sukcesis, ke UEA kaj Sennacieca Asocio-Tutmonda (SAT) sendu leteron al Stalin pri ties agoj kontraŭ la sovetiaj esperantistaro kaj lingvoj.

Sed la ĉefa sukceso de Lapenna okazis en Montevideo. En 1954 li vojaĝis tien, kie danke al lia agado UNESKO akceptis **rezolucion**, kiu sub-tenas nian movadon. Post tiu granda **venko** la membraro de UEA akceptis lin kiel **ĝeneralan sekretario** (1955-1964) kaj poste kiel prezidanton (1964). Dum tiuj jaroj li organizis novajn fakojn en la asocio, somerajn universitatojn ktp, tiel brile, ke la membraro de UEA kreskis kaj eĉ superis tiun de SAT. Tamen, en 1966 simila agado, ĉi-foje en Unuiĝintaj Nacioj per unu miliono da personaj sub-skriboj kaj 3846 organizoj, klare malsukcesis. Sam-tempe nekonto pri li iĝis iom post iom pli granda ĉar, laŭ oni-diroj, lia troa **postulemo** iĝis lin ne-el-tenebla. Dum la Universala Kongreso en Hamburgo (1974) li antaŭ-vidis sian malvenkon en la **voĉ-donado** por elekti la prezidanton. Pro tio li ekŝiĝis de UEA ne sen por-okaza parolado al siaj kontraŭuloj.

Lapenna mortis la 15an de decembro 1987 kaj post-lasis ege bonajn **eseojn** kaj paroladojn, kiuj montras lian mirindan arton pri la uzo de la lingvo: *Retoriko* (1950), *Faktoj pri Internacia Lingvo* (1952), *Principaro de Frostavallen* (1956), *Esperanto en perspektivo* (kune kun Ulrich Lins kaj Tazio Carlevaro, 1974).

Gerard Escuer

L'Associació Catalana d'Esperanto només es manté amb les vostres aportacions



Fes-te'n soci

Com a soci de KEA rebràs el Kataluna Esperantisto, estaràs al corrent de tots els esdeveniments, tindràs rebaixa als congressos... però sobretot estaràs contribuïnt amb el moviment esperantista a casa nostra.

Progresantoj: Disaj sed ne misaj

Imagu vin sen via hejmo, sen amikoj krom du aŭ tri familioj, sen fiksa loĝejo, sen via urbo, eĉ sen via patrujo. Fakte ne estas necese imagi tion, simple rimarku kiel vivis, kaj ankoraŭ nun kelkaj el ili plu tiel vivas, la romaoj.

Kiel neinvititaj gastoj, la romaoj suferis, kaj daŭre suferas, apartigon disde la socio, senlaborecon, antaŭjuĝojn, **rasismon**. Laŭ la **ĵurnalo** *The Guardian*, en Ĉeĥio 75% el la romaaĵ infanoj estas edukataj en lernejoj por nekapablaj lernantoj, kaj ili suferas 70% da senlaboreco kiam iĝas plen-kreskuloj. En Hungario senlaboras 74% el la romaaĵ viroj kaj 83% el la romaaĵ virinoj. En Slovakio, tiu problemo trafas 80% el ili (laŭ donitaĵoj de 2003). Tamen, mirinde la romaaĵ kutimoj postrestas kaj la romaa lingvo supervivas.

Oni ne scias, kial antaŭ mil jaroj grupo da homoj loĝantaj en Hindio, plej eble en Panĝabio, komencis sian translokiĝon tra Afganio, Persio kaj Anatolio ĝis Eŭropo. Tio klarigas, kial la romaa rilatas al nordaj lingvoj de Hindio, kaj kiel la romaa vortaro prenis novajn erojn el la renkontitaj lingvoj. Tiel, kelkaj studoj montras, ke estis en Anatolio, kie la romaoj iĝis **nomadoj**. Ekzemple: la vortoj *grast* (ĉevalo) kaj *char* (herbejo) devenas el la armena; *vurdon* (**ĉaro**) el la kurda kaj *drom* (vojo) el la greka. Tamen, nun-tempe ne ĉiu romao parolas sian nacian lingvon. Tial en Rumanio, kie loĝas multaj el ili, la lingvisto Gheorghe Sarău kreis

unuigitan kaj purigitan lingvon, kiu helpas ankaŭ superi la lingvajn diferencojn inter la romaaĵ grupoj.

Tiuj grupoj estas la kalderaŝoj, loĝantaj en Balkanio kaj centra Eŭropo; la kaleoj loĝas en Iberio, en la norda parto de Afriko kaj en Okcitanio; la manuŝoj (ankaŭ nomitaj sintoj) loĝas en Francio kaj en Germanio; kaj la romniĉaloj en Britio. Oni ne devas konsideri romaoj aliajn nomadajn grupojn ne hind-iranajn, nome: *jenische*, loĝantajn en Germanio; *tartere*, en Skandinavio, *travellers* de Britio kaj Ebro; kaj *quinquis* (ankaŭ nomitajn *merchers*) en Iberio (ĉu vi memoras El Lute?).

Same kiel la judoj, la romaoj estis amase mortigitaj dum la dua mond-milito. Tion ili nomas per la vorto *porajmos*, signifanta **voradon**, do tiel okazis, ĉar la kunlaboranta hungara registaro sendis al Aŭŝvico 30 000-70 000 romaojn, la tiama kroata registaro sendis tien 26 000 kaj la ŝtato de Antonescu (Rumanio) malliberigis 25 000 romaojn en Moldavio, kie 11 000 el ili mortigis.

Antaŭ tiom da suferoj eble iu demandos sin, ĉu la romaoj eraris, kiam ili komencis sian mil-jaran vojaĝon. Nu, danke al tiu ago la romaoj iĝis mirinda unu-nura popolo kaj ja ni devas gratuli tion, ke ili loĝas inter ni.

Gerard Escuer

rasismo: malamo kontraŭ homaj grupoj havantaj alian haŭt-koloron.

ĵurnalo: ĉiutaga gazeto.

nomado: tiu, kiu ne havas fiksan lokon por loĝi.

ĉaro: veturilo tirata de bestoj

vori: manĝi kiel besto



Ni laste ricevis

Diversaj aŭtoroj. Samideanoj. Sezonoj, Kaliningrado, 2006. 80 p. 7 €.

Nia libroservo ricevis la lastan verkon de la aktiva kaj elstara eldonejo Sezonoj. La libro prezentas 27 mallongajn satirojn kaj humuraĵojn pri esperanto kaj esperantistoj el 21 aŭtoroj, i.a. Schwartz, Baghy, Lejzerowicz, Beaucaire, Štimec, Neves, Johansson, Camacho, Steele kaj Dek. Tamen ne estas Abel Montagut, de kiu ni ĉerpis ĉi tiun rakonteton, kiu certe taŭgas por dua volumo de la libro.

Kosma civitaneco (Dua letero)

Abel Montagut (el Sferoj 10)

— Hare Zamen, Hare Zamen...

— Zamen, Zamen...

— Hare Zamen, Zamen Hare!

La chielarke tunikay razkapuloy tamburbate dissaltadis. Triopo alproksimijis al la tabloy sur la taverna trotuaro.

— Konvertiju, ho pekuloy, se vi deziras liberigi vian animon de la inferay poreternay punoy.

Ili surmanigis oranjkolorayn faldfolioyn al la trinkantoy.

— Kio do estas chi uloy? — demandis Marushka al sia kunulo.

— Ho, ili estas teranoy — sorbetis limonadon Senshu—. Tute ne zorgu. Ili sendanjeris.

— Teranoy? Mi supozis ke... Kion ili umas en la Galaksia Sideyo?

— Chu vi ne renkontis ilin pli frue?... Ho, mi forgesis, karulino, vi jhus alvenis el Dudarsa. La tunikuloy propagandas la idealon de Zamenhof.

— Zamenhof? — la nigrayn brovoyn kuntiris Marushka, kvazau serchante en la cerba komputilo.

— Yes, la terano kiu lanchis intespon en la yaro 266 antau la kosmovoyajoy — afablis Senshu.

— Ho, mi memoras. Mi parkerigis tion en la elementa lerneyo, kvankam mi devas rekoni ke miay notoy ne estis superbrilay. Tamen, lia lingvo farijis oficiale akceptita en la galaksio antaulonge, almenau de du mil yaroy, kaj oni jenerale uzas jin, ekzemple ni mem...

— Efektive, sed la razkapuloy insistas ke ji estas esence ligita kun ia praideologio kiun ili nomas Togoco.

— To... go... co? Chu siglo?



— Certe, el “TransGalaksia Civitaneco” — Senshu shovis manon sur la perfektan femuron de la kunulino —. Lau ili tute ne gravas ke la lingvo kosme disvastiis. La idealo de Zamenhof restas plu nerealigita.

La irizay tunikuloy yam preterangulis dum la tamburado plu resonis super la centra kvartalo Oguro.

— Strangay uloy, certe ya — la violkoloran sukon shi fintrinkis.

— Interesay specimenoy — sparkokule Senshu shin alrigardis —. Nu, ili estas postrestajoy de la nebridebla diverseco reganta en ilia planedo antau la lasta kosmomilito.

— Ho, yes... bedaurinda, sed neevitebla milito — siayn manoy n poshtuke purigis Marushka.

— Kiel chiuy, cetere — langoklakis Senshu.

Paginte la trinkajhoyn per sia telekomandilo, la du robotoy ekstaris, enkayutijis en sian libel-auton kay forflugis.

Noto: La rakonto aperas laŭ ortografio, kiu identas al la Fundamenta Help-Alfabeto, krom: “gh” = j; “j” = y.